

NOVA RETEJA STRATEGIO POR ILEI

Propono SMG: aug 30 2021

1. Publika multlingva retejo

Teknike:

Kapablo subteni multajn alfabetojn, t.e. esti Unikod-konforma.

Ebligi interaktivajn elementojn – diskutejojn, reagejojn

Videblo en mov-telefonoj kaj similaj.

Eblo direkti homojn al aliaj fideblaj informfontoj

Enhave:

Bazaj informoj pri Esperanto – emfaze la nunajn perspektivojn

Aspektoj de lingva kaj kultura justeco

La lernfaciligaj valoroj de Esperanto por akiri pliajn lingvojn.

La riĉaj kulturaj ebloj de Esperanto

Bazaj informoj pri la celoj kaj agado de ILEI.

2. E-lingva retejo por la Eo-komunumo

Teknike:

Ebligi interaktivajn elementojn – diskutejojn, reagejojn

Videblo en mov-telefonoj kaj similaj.

Eblo direkti homojn al aliaj fideblaj informfontoj

Enhave:

Loko por vidigi lastajn novaĵojn

Aktualaj informoj pri la tuj sekva Kongreso de ILEI

Aktualaj informoj por la komitatanoj de ILEI.

Efika, moderna, komprenebla voĉdonsistemo por la komitato kaj estraro.

Aktualaj informoj pri la nuna estraro, kun kontaktabloj kaj regula raportado.

Aktualaj informoj pri la komisionoj de la Ligo.

Aktualaj informoj pri la eldonaĵoj de la Ligo. Libroj kaj revuoj

Aktualaj informoj pri la sekcioj de ILEI kaj ebloj proponi sin.

Aktualaj informoj pri la Fondaĵoj de la Ligo

Resumaj informoj pri la membraro de la Ligo.

Ligiloj al la retejoj de la partneroj de ILEI.

Aktualaj informoj pri ekzamenoj kaj universitata agado.

Gvidiloj pri oficejo kaj agadoj.

Varbiloj aktualaj en multaj lingvoj
Kolekto de utilaj pedagogiaj dokumentoj (ekzistas).

3. E-lingva retejo por konservi la historion de ILEI

Teknike:

La nuna retejo povos plenumi tiun funkcion.

Enhavo:

Informoj pri la Honoraj Membroj de ILEI – laŭeble kun biografioj.

Informoj pri la antaŭaj kongresoj de ILEI – ekzistas

Informoj pri la pasintaj prezidantoj – parte ekzistas.

Informoj pri pasintaj ekzamenrezultoj (1991-95 ekzistas)

Laŭjara kolekto de historiaj dokumentoj – grandparte ekzistas

Historiaj financaj dokumentoj: malnovaj buĝetoj kaj rezultoj (multaj ekzistas)

Arkivo de malnovaj varbiloj (ekzistas)

Arĥivo de dokumentoj pri ILEI kaj Unesko (ekzistas)

4. Interna administra sistemo

Teknike:

La kapablo flekseble trakti administrajn datumojn.

La kapablo rigore protekti tiujn datumojn kaj popersono permesi aŭ bloki aliron.

Eblo komuniki resumajn informojn al ĉefe retejo 2.

Enhavo:

Membro-registrado

Financaj datumoj pri la membroj kaj servoj.

Enestu ebloj aliri estintajn datumojn por ebligi plurjarajn analizojn.

Konklude

Prefere tenu la kvar funkciojn disaj sed kun la kapablo komuniki unu al la alia ĝis necesa grado. Ni lernu de la sperto de UEA, kiu elspezis amase, trarulis tri liveruntojn kaj eĉ nun ne havas publike uzeblan version de AKSO, ok jarojn de post la komitato aprobitan planon renovigi ilan sistemon. Ili klopodis vane krei sistemon kiu solvos ĉiun bezonon. Ĉiuj ovojn en unu korvo. ILEI kreu pli dis-ovan strategion.

ILEI devas ne nur krei novan retejan sistemon, ĝi devas krei la infrastrukturon por nutradi, aktualigi kaj protekti ĝin. La starigo estas la facila partol!

ILEI/PLANADO